

UNIVERSO

Internacia Revuo por la Belo



Kun

Profesoro D^{ro} Siegfried Lederer
Prag Weinberge
Nerudagasse 4

redaktita de

D^{ro} Albert Schramm
Dresden 20

Eldonejo:
Heckners Verlag, Wolfenbüttel
1910

ENHAVO:

	pago
Al la majstro	161
La hejmveturado. De Marie Hankel	162
El la Biografio de D-ro L. L. Zamenhof. De D-ro Leono Zamenhof. Kun bildoj	170
Historiaj detaloj. De Adam Zakrzewski. Kun bildoj	178
Firmo Hachette kaj Esperanto. Kun bildoj	181
Sur lir' dukorda. Kun bildoj	186
Arta aldono: Lazaro Ludoviko Zamenhof.	

La Universo

aperas ĉiumonate. La abonprezo estas por unu jaro 6 markoj (= 3 Sm), por duona jaro 3 markoj (= 1½ Sm). Mensekondoj nur al Heckners Verlag, Wolfenbüttel (Germanujo).

Kiu volas interŝanĝi kaj liveri por alsendotaj maloftaj, plejmalgrandaj rusaj moneroj diversajn mineralojn kaj ŝtonigaĵojn kun la sciigo pri ilia deveno skribu sub adreso: A. Maske, Dresden, Schubertstraße 13 (Germanujo).

Esperanta Universala Biblioteko

Redaktoroj:

Prof-ro D-ro Siegfried Lederer kaj Ases-ro D-ro Albert Schramm
Prag-Weinberge Dresden 20

..... 1.


Andersen Bildolibro sen bildoj.

El la dana originalo
tradukis

Prof-ro D-ro Siegfried Lederer
Prag-Weinberge.


VIII + 35 paĝa, kun la portreto de Andersen,
bele bindita 1 Marko = 0,50 Sm.


Heckners Verlag, Wolfenbüttel (Germanujo)





LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF
AŬTORO DE LA LINGVO ESPERANTO





Al la majstro.

De longe sub verda standardo revuloj
Por nobla batalas afero,
Al ili ariĝas geniaj pensuloj,
Neniuj sin sentas ĉe ili fremduloj,
Ĉar ĉiujn kunligas espero.

La tero traĝis de sango la frata
Fluanta dum longaj jarmiloj,
Sed teron sekigos estonto benata
De l' nia ideo plej kara, amata
De l' hela estonto sunbriloj!

Hej, fratoj karegaj, de l' vero senditoj,
Per vortoj de flama fervoro,
Ni igu en homojn la noblajn ekscitojn,
Ni veku kuŝantajn en dormo spiritojn,
Kuraĝe al paca laboro!

El brustoj de l' homoj forigu ni ŝimon,
Estonto pli hela ekflamu!
Ni veku al ago en koroj maltimon,
Ĉar vidas ni ĉiuj de celo proksimon,
Ni vivon pli bele ornamu!

Regnanoj de l' mondo, celantaj la pacon
Sur tero la amon ni semas,
Vilaĝan dometon aŭ riĉan palacon,
Ni ĉion vizitas, ne konas ni lacon
De ĉiuj ni korojn alpremas!

Dum iro nenia haltigos nin baro,
 Nek venkos la vortoj kruelaj,
 Ni portas la amon al tuta homaro
 Por nia ideo en ĉiu la faro
 Ni restos eterne fidelaj!

Hej, fratoj amataj, de l' vero senditoj,
 Ni veku kuŝantajn en dormo spiritojn,
 Ni restu eterne fidelaj al Majstro!

Verkis Stanislaw Karolczyk (Lodz).



La hejmveturado.

Originale verkis Marie Hankel.

La sesa internacia Esperantista kongreso en Waŝingtono finiĝis. Ĉio estis bela kaj kontentiga. Tre agrablan semajnon mi post la kongreso travivis ĉe gesamideanaj amikoj en Boston, sed la plej bela ankoraŭ sekvis, la hejmenvojaĝo kune kun la Majstro kaj lia edzino. Ni estis ses Esperantistoj sur la granda bela ŝipo Kaiserin Auguste Victoria. Ho, kia feliĉa sento, kiam denove muziko salutis la unuan pasaĝeron, enirantan la ŝipon! Nun ni denove estis en nia senzorgejo, dum dek tagoj ni spiros la puran aeron de la maro, ni aŭdos ĝian dolĉan bruadon kaj muĝadon. Strange estas, ke sur ŝipo oni neniam pensas pri danĝero, oni sentas bonan, grandan ŝipon sub la piedoj, oni havas konfidon kaj estas trankvila. La vetero estis bona, tiel trankvila estis la maro, ke ankaŭ nia Majstro, kiu inklinas al marmalsano, ĉiam bone fartis. Por li la ŝipo estas tre taŭga loko. Tie li estas devigata ripozi de sia troa laboro. Li ja estas okulkuracisto kaj laboras la tutan tagon, de la mateno ĝis la vespero. Kaj vespere kompreneble li laboras por Esperanto. Por viviĝi siajn fortojn li intertempe ĉiam fumas cigaredojn. Krom tio li estas kormalsana kaj faras delikatan impreson. La tuta esperantistaro ja deziras, ke li ne tiel multe laboru, sed tio restos verŝajne vana deziro. Ŝajnas al mi, ke li neniam akceptos monon por si mem. Li estas tro aristokrata por tio, eble li ankaŭ deziras resti tute libera. Estas ja fakto, ke oni perdas la liberecon, akceptante monon.

Sed nun sur la ŝipo laboro ne ekzistis. Ni ĝuis la agrablan, iom tro luksan vivadon de la unua klaso. Ni promenis, manĝis, aŭdis muzikon kaj rigardis la maron. Legante ni ankaŭ sidis en niaj kuŝoseĝoj. Ili sin trovis sur la „Sonnendeck“ (sunoferdeko), tiun nomon havis la sesa etaĝo de la ŝipo. Niaj kajutoj sin trovis en pli malaltaj etaĝoj aŭ ferdekoj. Per lifto ni multfoje ĉiutage supren kaj malsupren iris. Niaj ses seĝoj staris en vico, unu apud la alia. Tie ni sidis multajn horojn kun niaj libroj. Kelkfoje mi sidis apud la Majstro. Li afable diris al mi: „Mi ne estas parolema homo, pardonu, ke mi estas silenta. Sed, se vi deziras paroli aŭ ion demandi, mi estos ĉiam preta respondi. Mia legado ne estas grava, mi ĝin volonte interrompos.“ Kompreneble mi ne trouzis ĉi tiun amindan permeson, tamen mi aŭdis multajn interesajn eldirojn el la buŝo de la Majstro. Ĉiu vorto estis tiel mirinde klara kaj saĝa, ke mi nur povas konsili: „Se vi estas duba aŭ necerta pri iu ajn esprimo en nia lingvo, demandu la Majstron, lia respondo certe vin kontentigos.“

Jen malgranda ekzemplo: Ekzistas unuiĝo por la enkonduko de la tiel nomata „Monosystem“, certa, egala formato de presajoj. Ni esprimis la bedaŭron, ke la vorto monosistemo havas alian sencion en Esperanto. „Oni ja povas diri monoa sistemo,“ diris la Majstro. Jes, tiel oni certe povas diri!

Vi ja scias, ke nia Majstro neniam proponos ŝanĝojn en nia lingvo. Tamen li diris: „Mi ne povas antaŭvidi la estontecon, mi ne volas min kateni. Certe mi nenion ŝanĝos sen la Akademio, la Lingva Komitato kaj la Esperantistaro.“ Estas rimarkinde, ke la Majstro ĉiam citas la Esperantistaron kiel samrajtan juĝanton de lingvaj aferoj.

Ĉiuj proponoj pri ŝanĝoj lasas lin tre trankvila. Li aŭdas ilin sen ia emocio. „Tion mi konas de 23 jaroj,“ li diris. „Mi ricevis sennombrajn leterojn kun la certigo, ke la skribinto plene aprobas la fundamenton, ke li neniam kaj neniel konsentus je iu ajn ŝanĝo. Sed tre ofte la skribinto en la sama letero tamen proponas unu malgrandan ŝanĝon, kiu laŭ lia opinio estas dezirinde. Kompreneble ĉiu havis alian deziron, ĉiu havis sian propran guston kaj opinion. Sekvinte la konsilojn, mi devus ŝanĝi la tutan lingvon.“

Pri la Idistoj la Majstro estas trankvila. Ili ne daŭre nin malhelpas, ĉar ili ne estas unuanimaj. Ankaŭ ili havas inter si diversajn opiniojn, same kiel ni. Ĉar ili ne havas la volon rezigni

iun ajn opinion, ili certe disiĝos iatemp. D-ro Zamenhof tre deziras, ke oni pli uzu, aĉetu kaj konu la fundamenton. Li deziras, ke ĉiu Esperantisto posedu ĉi tiun libron. Multaj ĝin eĉ ne konas, personoj, kiuj tre decide parolas pri la fundamento ne posedas ĉi tiun gravan libron.

Laŭ la deziro kaj la opinio de la Majstro ĉiu lernolibro havu sur la unuaj paĝoj la 16 regulojn de la fundamento, la cetero nur estu komentario de tiuj ĉi reguloj. Nur la 16 reguloj estu la oficiala parto, la komentario estu privata laboro. Li malaprobas dikajn lernolibrojn por komencantoj, ili fortimigas la homojn. Nia lingvo ĉiam devas esti simpla kaj facila. Ekzistas nun la inklino, malfaciligi ĝin. Ni ne forgesu, ke al la unuaj Esperantistoj sufiĉis la 16 reguloj de la „Plena lernolibro“ de 1887.

Kiam D-ro Zamenhof dek jarojn antaŭ tiu ĉi epoka jardato estis elpensinta la internacian lingvon, ĝia gramatiko estis multe pli ampleksa. Li intence ĝin faris ĉiam pli malgranda, li reduktis ĝin je la famaj 16 reguloj, kiujn li nomis: Plena lernolibro de internacia lingvo. Li sciis, ke el tiu ĉi malgranda lernolibro kaj el la vortaro de 900 vortoj la lingvo povos elkreski. Li kreis la lingvon en tia maniero, ke ĝi estu sendependa de lia vivo.

„Se mi tiam tuj estus mortinta“, la Majstro diris, „la lingvo povus evolucii sen mia helpo el la fundamento.“

Ni komprenas, ke D-ro Zamenhof de la komenco deziris, ke la 16 reguloj ne estu ŝanĝitaj. Pri la 900 vortoj de la „Plena lernolibro li neniam postulis, ke ili sufiĉu por ĉiama tempo. Ili ja sufiĉis al s-ro Grabowski por la traduko de la „Gefratoj“ kaj aliaj poeziaj verkoj, sed tamen la Majstro bone sciis, ke la vortrezoro devas ĉiam kreski. Li aprobas la enkondukon de novaj vortoj, se ili estas necesaj. Nur se jam taŭga vorto ekzistas, oni ne enkonduku novan esprimon por la sama aŭ simila ideo. Iun ajn danĝeron la Majstro ne vidas en la enkonduko de novaj vortoj. Li opinias, ke malbonaj kaj ne taŭgaj vortoj baldaŭ malaperos, la bonaj nur restos. Interese estas, ke ĝenerale la homoj ne enkondukas vortojn el la propra nacia lingvo, aldonante la „o“, tio ŝajnas al ili ridinda. D-ro Zamenhof tion mem spertis, kiam li estis devigata elekti polajn vortojn. (Sed la francoj? Ĉu ili ne tre inklinas al la enkonduko de novaj vortoj el sia lingvo?)

Ankaŭ neologismon oni povas enkonduki; tio „oni“ kompreneble estas la Akademio kaj la Lingva Komitato. Neologismo

estas nova formo aŭ esprimo, kiun oni povas uzi samtempe kun la malnova formo. Tiu ĉi eble iom post iom fariĝos malmoda, arĥaisma. Neologismo estis ekz. la permeso uzi la „h“ anstataŭ la supersignoj.

D-ro Zamenhof opinias, ke ni havas tro multe da gazetoj. Nove aperanta gazeto ofte malhelpas alian gazeton. Unu gazeto eble povas prosperi, la rivalo malhelpas al ĝi, ili ambaŭ mortas. Tio estas malbona por nia movado. Treege li deziras, ke oni aĉetu kaj legu librojn, ke oni eldonu bonajn verkojn.

Nia literaturo havu veran internacian valoron, oni elektu por la traduko nur bonajn klasikajn librojn. D-ro Zamenhof mem tradukis nur tiajn verkojn. La fabelojn de Andersen li opinias bonegaj, same la rakonton Marta. Pro tio li nun tradukas la bibliion; li havas la deziron, ke ankaŭ aliaj religiaj libroj estu tradukotaj, la korano kaj la sanktaj libroj de la budismo. Kompetentuloj traduku ĉi tiujn librojn. D-ro Zamenhof kredas, ke ĉiuj fondintoj de religioj, se ili persone renkontus, premus unu al la alia amike la manon, ĉar ili ja ĉiuj havis unu saman celon: ili volis igi pli bonaj kaj pli feliĉaj la homojn.

Ankaŭ nun ĉiuj celadoj por la bonfarto de la homoj laboras je tiu ĉi komuna direkto, levi, altigi, nobligi la homojn.

„Mi dezirus unuigi por komuna laboro ĉiujn klopodojn kaj entreprenojn, kiuj volas altigi la homan kulturon, por ke unu celado helpu al la alia“, li foje diris. Nia Majstro rigardas vasten, malproksimen, liaj pensoj kaj ideoj superflugas miljarojn, kiel profeto li vidas antaŭ si la estontecon, la senfinan, senliman evolucion de nia gento. Certe ne estas kaprico aŭ partianismo, ke la Esperantistoj tiom adoras la Majstron; efektive ekzistas ia mistera io en lia persono, kiu lin diferencigas de aliaj homoj.

Unu fojon mi havis la feliĉon ion aŭdi el la iama, estinta tempo, el la epoko de la elpensado de nia lingvo; mi estis permesata enrigardi en la spiritan laborejon de la genio. D-ro Zamenhof rakontis, en kia maniero li decidigis, ke la internacia lingvo havu artikolon. Li tiam ankoraŭ vizitis la gimnazion. Ĉar multaj lingvoj ne posedas artikolon, li dubis pri la bezono de tiu ĉi vorteto. Eble ĝi estis nenecesa. Pri tio unu songo donis al li decidon. En songo li iafaje staris sur kampo kun kelkaj homoj. La homoj parolis pri ia grava afero, ia malfeliĉo, kiu okazos, se el arbaro, kiun oni vidis en la malproksimeco, elvenos tri ruĝaj knabinoj.

La homoj timeme rigardis kaj observadis la arbaron. Subite unu el la homoj vokis: „Jen la tri ruĝaj knabinoj!“ La dormanto vekigis kaj nun sciis, ke la artikolo estas necesa kaj utila, la elvoko: „jen la tri ruĝaj knabinoj“ estas alia afero ol: „jen tri ruĝaj knabinoj“.

Tiu ĉi rakonto montris al mi, en kia senlaca maniero la animo de la elpensinto sin okupis pri la problemo. Mi nun riskis demandon. Mi demandis la Majstron, kiam li la unuan fojon parolis kun la patro pri sia ideo. „Estis tiam, kiam mi ankaŭ parolis kun la amikoj, antaŭ ol forlasi la gimnazion.“

„Kaj kion la patro diris?“

„Unue li ĝojis, kun intereso kaj plezuro li aŭdis pri la projekto, mia ideo tre al li plaĉis!“

„Kaj poste?“

„Poste unu amiko al li diris*), ke tio estis tre danĝera afero, ke ĝi estis la unua signo de frenezo, li estu tre singarda!“ La patro tion komunikis al la filo; la sekvo estis, ke la junulo neniam plu unu vorton parolis pri sia elpensajo. Ankaŭ la patro neniam plu diris, li neniam demandis, ĉu sia filo forlasis la projekton. Dum sep jaroj la juna Zamenhof plene silentadis. Sep jaroj da silento kun tiu ĉi ideo en la koro, tio similas al provoj, pri kiuj oni aŭdas en legendoj kaj fabeloj. Stranga afero estis, ke ankaŭ la amikoj de la gimnazio, kiuj ĵuris kunlabori, malaperis kaj silentis; ne unu el ili plu montris intereson.

Ludoviko Zamenhof do studadis la kuracarton kaj silentis, silentadis. La versaĵo: „Mia penso“ estas ekkrio el tiu turmenta epoko. Ĝi rakontas pri vera okazintaĵo. Juna fraŭlino kantis ŝercan kanton pri personoj, kiuj havas „fiksajn ideojn“, „kastelon sur la glacio“, kiel oni diras en pola lingvo. Ĉe tiu kanto la studento sentis, ke ankaŭ li havis sian „kastelon sur la glacio“, sian „fiksajn ideojn“. Ho, ĉu ĝi iam veriĝos? Kiu scias? La versaĵo: „Mia penso“ en ĝia nuna formo estas iom malsimila al la unua, origina formo, ĉar Zamenhof en ĉi tiu epoko ankoraŭ prilaboris kaj ŝanĝis la lingvon.

Dum tiuj sep jaroj de silentado la studento Zamenhof aŭdis pri Volapük. Estis en la jaro 1884. Dum du jaroj li vane klopodis por al si havigi lernolibron de tiu ĉi rivala lingvo. Fine li ĝin akiris, tio estis en la jaro 1886. Ni povas imagi, kun kia intereso

*) D-ro Zamenhof preferas meti la mallongan vorton antaŭe.

li ĝin studadis. Li tuj vidis, ke Volapük ne povos esti la lingvo de la estonteco. Ĝi estis konstruita laŭ maniero, kiun li mem projektis, sed poste malelektis. Ĝi dependis de la persono de la elpensinto, ĉiu vorto devis esti kreata, Zamenhof kontraŭe havis la ideon, ke internacia lingvo estu sendependa kaj preta, krom tio facila kaj konforma al vivantaj lingvoj. La ĉefokupado dum la sep jaroj de silentado estis la plimalgrandigado de la gramatiko. Kiel bona artisto li forprenis, eligis ĉion superfluan, nenecesan. La rezultato estis la „Plena lernolibro“, niaj admirindaj 16 reguloj.

Per kiu okazintaĵo nun finiĝis la sepjara silentado? Kiu estis la savinto, la liberiginto? Ĝi estis saventino, fraŭlino Klara Silbernik, nun la kara edzino de la Majstro. En Varsovio, kie ŝi vizitis parencojn, li konatiĝis kun ŝi. Al ŝi li malkaŝis sian misteron, ŝi entuziasme aprobis, neniel ŝi dubis pri la sukceso, nun fine li havis unu disciplon, disciplon fervoran kaj fidelan.

Interese estas aŭdi, kion nun diris sinjoro Silbernik, la patro de la juna fianĉino. Ĉi tiun fojon okazis la malo, kiel ĉe patro Zamenhof. S-ro Silbernik en la unua momento diris: „Tio ja estas frenezajo“, sed nur en la unua momento; kiam li pli bone komprenis la artan konstruon de la internacia lingvo, li plene konsentis. La feliĉa fianĉo, nia kara D-ro Ludoviko Zamenhof, nun fariĝis kuracisto. Belan amindan fianĉinon li havis, sed mankis la klientaro. Ankaŭ io alia mankis kaj tute ne estis trovebla: eldonisto por la lernolibro. Vane li klopodis pri tio. Unu, kiu jam promesis presi la broŝureton, poste nuligis la kontrakton. Kion fari? Nenia helpo trovebla! Kiam oni pripensas, kiom da nenecesaj libroj estas presataj, oni miras, ke tia altvalora broŝuro ne trovis eldoniston. La danĝero efektive ekzistis, ke la genia laboro de multaj jaroj estis vana, ke la mondo neniam konatiĝis kun Esperanto. Sed helpo venis. La bopatro Silbernik donis ĉiun bezonatan monhelpon. Tiu ĉi nobla kaj modesta viro neniam dubis pri la boneco de la projekto, li eĉ kuraĝigis la bofilon. Estis bona ŝanco, ke li estis sufiĉe riĉa komercisto; li povis pagi la presiston. D-ro Zamenhof nun eldonis la libron 1887 en rusa kaj pola lingvoj; la duan de Majo li ricevis la cenzuran permeson. Favora okazo estis, ke la cenzuristo estis amiko de la familio, li opiniis, ke la afero estis senkulpa sensencaĵo. La libro do efektive aperis; la feliĉa Doktoro povis donaci ĝin al sia fianĉino, ĝi estis la sola fianĉa donaco, kiun li donis kaj povis doni. Kia valorega donaco! Feliĉa tiu, kiu

povas doni tian multvaloran trezoron; ĝi superas ĉiujn diamantojn de la mondo. Tiu ĉi modesta kajero estis kvazaŭ la sorĉa ŝlosilo por la estonta vivo de la juna gefianĉa paro.

La 9a de Aŭgusto estis la edziĝa tago. Kaj en la sama jaro, en kiu gesinjoroj Zamenhof festos sian arĝentan edziĝotagon, ankaŭ Esperanto havos sian 25jaran jubileon. Kia feliĉa koincido!

La junaj geedzoj loĝis en Varsovio, sen kliento kaj preskaŭ sen pano. D-ro Zamenhof havis sufiĉe da tempo por la forsendado de sia lernolibro. La tutan tagon li sidis serĉante adresojn, al kiuj li senpage forsendis la „Plenan lernolibron“, enhavantan folietojn subskribotajn de aprobantoj. Alian laboron li ja ne havis, ĉar malanuloj obstine ne venis.

Sed venis folietoj, iom post iom alvenis 1500 aprobaj subskriboj. Kvankam tio ne estis miliono, ĝi tamen estis sufiĉa granda nombro; ni povas imagi, ke ĉiu folieto alvenanta tre ĝojigis la junajn geedzojn. Aperis ankaŭ la filo, por plenigi la feliĉon.

Sed ĉar la klientaro neniel venis, D-ro Zamenhof forlasis Varsovion por serĉi laboron kaj panon en malgranda sudrusa urbo. Sinjorino Zamenhof dume loĝis en la patra domo en Grodno en Rusujo; tie la filino naskiĝis. Sed la klopodo de la Doktoro estis vana; ankaŭ en la suda urbeto laboro ne estis trovebla. La vintro malebligis la revenon al la hejmo; li devis atendi la printempon. Dum kelka tempo la tuta familio loĝis en Grodno, nur post kelkaj jaroj ĝi revenis al Varsovio kaj per la helpo de patro Silbernik fine sukcesis.

Samtempe Esperanto ĉiam okupis la doktoron.

Kun granda ĝojo la unuaj kunlaborantoj estis akceptataj de la dankaj kaj modesta elpensinto, varman kaj sinceran memoron li konservas al tiuj unuaj helpintoj; kun profunda doloro li bedaŭris la tro fruan morton de Einstein en la jaro 1890.

Sed ankaŭ gravaj zorgoj por Esperanto komenciĝis. Preskaŭ ĉiu Esperantisto proponis iun ajn ŝanĝon aŭ plibonigon, kompreneble ne ĉiam la samajn. Por fini la multajn turmentojn D-ro Zamenhof en la jaro 1894 mem proponis kelkajn ne tro grandajn ŝanĝojn, certe kun malĝoja koro. Li tiam estis mem redaktoro de la unua en Nürnberg aperinta gazeto „La Esperantisto“. Estis do facile aranĝi voĉdonadon per tiu ĉi gazeto. La rezultato estas konata: 157 Esperantistoj voĉdonis kontraŭ ŝanĝoj, 105 por ili.

Nun komenciĝis la florado de Esperanto.

Sed ne tuj, ĉar jam en la sekvanta jaro nova malfeliĉo okazis: La grafo Leo Tolstoj skribis du artikolojn por la gazeto „La Esperantisto.“ Post la dua artikolo la gazeto estis malpermesata en Rusujo. Ĉar ĝi havis en tiu ĉi lando la plej multajn abonantojn, ĝi devis ĉesi. La gazeto baldaŭ reaperis sub la nomo „Lingvo Internacia“ en Upsala, ĝi migris al Budapeŝto, kie Lengyel estis la redaktoro, nun ĝi aperas en Parizo, redaktata de la sinjoroj Cart, Corret kaj Lengyel.

Malgraŭ tiu ĉi malfacilaĵo oni povas konstati, ke de la decida jaro 1894 la vera surpriza venko de Esperanto sin montris. Kia ĝojo por la Majstro kaj la kara Majstrino, precipe ankaŭ por la senlace helpema patro Silbernik, kiu feliĉe ankoraŭ postvivis la unuan kongreson en Boulogne-sur-Mer.

Kun granda emocio gesinjoroj Zamenhof antaŭvidis ĉi tiun unuan kongreson. Ĝi estos la provo, ĉu Esperanto efektive taŭgos kiel internacia lingvo, ĝi estos la pruvo, ke la problemoj estis solvitaj, la kongreso estos la kronado de la verko, la atesto de la definitiva venko.

Sed denove grava obstaklo baris la vojon; okazis io, kiu preskaŭ malebligis la partoprenon de la Majstro en la kongreso. La rusa-japana milito ekkomenciĝis, oni volis sendi nian Doktoron Zamenhof en la militon. Li ja estis kuracisto kaj oni bezonis multajn manojn dum la sangaj aferoj. Pro la esplorado de lia sano, li estis devigata estadi unu semajnon en malsanulejo. Oni lin opiniis tro delikata pro lia kormalsano; li estis liberigita de la milita servo. Ĉiujn liajn fratojn oni forsendis al la batalkampoj.

La Gemajstroj do veturis Bulonjon, post 18 jara edziĝo la unua granda komuna vojaĝo! Kaj nun okazis tre feliĉa koincido: la 9a de Aŭgusto, la dato de la fama Bulonja deklaro estis la edziĝotago de gesinjoroj Zamenhof. Neforgesebla bela tago, ĝojiga rekompenco post maldolĉaj, akraj spertoj!

La Bulonja kongreso estis la unua granda sukceso, la unua paŝo en la granda publika vivo. Kaj nun, post nur kvin jaroj, ni jam traveturis la oceanon, nia standardo estis vidata en la lando de la libereco kaj de la energio. Nia Majstro, malgraŭ sia delikata, neforta korpo riskis la longan, lacigan vojaĝon, li nun denove laboras por sia familio kaj por nia komuna granda ideo. Ni helpu al li per nia tuta forto, energia laboro, ĝis ni por ĉiam atingis la celon. Vivu Esperanto!

Marie Hankel.

10

El la Biografio de D-ro L. L. Zamenhof.

Originale verkis D-ro Leono Zamenhof.

Lazaro Ludoviko Zamenhof naskiĝis la 15-an (laŭ la rusa kalendaro la 3an) de Decembro 1859 en la urbo Bialystok (gubernio de Grodno). Liaj gepatroj estis Marko kaj Rozalio (naskita Sofer). Lia patro havis lernejon kaj krom tio donadis privatajn lecionojn de germana kaj franca lingvoj. De sia plej frua juneco Ludoviko Zamenhof ĉiam estis tre revema, pensema kaj impresebla, kaj oni konis lin kiel infanon eksterordinare kaj ĉiuflanke kapablan. Li komencis lerni tre frue: havante la aĝon de kvar jaroj, li jam bone legis kaj skribis.

Lia sano estis tre delikata, kaj en sia infaneco li ofte estis malfacile malsana. En Aŭgusto 1869 li komencis la studadon en la Bialystoka Reala Lernejo; sed ĉar li tiam ne havis ankoraŭ la aĝon de plenaj 10 jaroj (kion la leĝo tiam postulis), tial oni ne



La patro de D-ro L. L. Zamenhof.

kalkulis al li tiun jaron, kaj efektiva lernanto de la unua klaso de la lernejo li povis fariĝi nur en 1870. En Decembro de 1873 liaj gepatroj transloĝiĝis Varsovion, kie lia patro akceptis la oficon de inspektoro de privata lernejo kaj baldaŭ poste ricevis la oficon de profesoro de la regna Varsovia Reala Lernejo. Laŭ la konsilo de konatoj la patro de Ludoviko decidis, ke li lernu la lingvojn latinan kaj grekan kaj daŭrigu sian studadon en gimnazio filologia. En Aŭgusto 1874 li efektive ekzameniĝis en la Varsovia 2a gimnazio kaj estis akceptita tien kiel lernanto de la 4a klaso.

Dum la tuta gimnazia tempo, kiel en Bialystok, tiel ankaŭ en Varsovio Zamenhof estis ĉiam la unua en sia klaso. Li ĉiam estis sincere amata de ĉiuj siaj kolegoj. En ĉiuj demandoj lia opinio estis ĉiam rigardata kiel la plej aŭtoritata.

En la gimnaziaj jaroj lin varmege interesis diversaj sociaj demandoj. De la plej fruaj jaroj li revis pri la solvo de diversaj sociaj problemoj. Sed plej multe interesis lin la problemo de intergentaj rilatoj, kiu instigis lin al kreado de neŭtrala intergenta lingvo. En la komenco de la vintro de 1878 la primitiva formo de tiu lingvo estis preta kaj Zamenhof kun siaj gimnaziaj kolegoj (en sia ĉambreto ĉe la strato Nowolipie Nr. 28) aranĝis feston, kiun ili nomis „Tago de vivigo de la universala lingvo“.

Sed pro diversaj kaŭzoj la kolegoj de Zamenhof baldaŭ tute malvarmiĝis por la afero. Ili venis al la konvinko, ke, malgraŭ ke tion faras la ĝis nun ĉiam aŭtoritata „Zamenhof mem“, la kreado de lingvo estas infanaĵo, kiu por ili, kiel nun jam „maturaj homoj“, ne konvenas. Al tio aliĝis ankoraŭ la cirkonstanco, ke la patro de Zamenhof rakontis pri la laboroj de sia filo al la direktoro de unu el la Varsoviaj gimnazioj, kaj tiu diris al la patro, ke lia filo estas por ĉiam perdita, ke lia laborado estas plej senduba simptomo de komenciĝanta nesaniĝebla frenezo. Zamenhof devis promesi al sia patro, ke li almenaŭ ne elpaŝos publike kun sia laboro, antaŭ ol li finos la studadon en la universitato kaj fariĝos kuracisto. Ĉio ĉi tio kaŭzis, ke Zamenhof decidis ne paroli plu kun iu pri sia ideo kaj labori tute izolite.

En Junio 1879 Zamenhof finis la kurson gimnazian, kaj en Aŭgusto li forveturis en la urbon Moskvo, por studi medicinon en la tiea universitato. Por ne esti ŝarĝo por siaj gepatroj, kies financa stato neniam estis sufiĉe bona, Zamenhof serĉis en Moskvo ian okupon, sed bedaŭrinde nenion povis trovi. Tial post du jaroj li forlasis Moskvon kaj revenis Varsovion, kie li daŭrigis sian studadon en la universitato. En Januaro 1885 li finis la universitatan kurson kaj ricevis diplomon de kuracisto. Tiam, por komenci laborenspezi por sia vivo, li forveturis en tre malgrandan urbeton Wejseje (Suvalka gubernio), kie loĝis lia fratino Fanny Pikower kaj kie li komencis sian medicinan praktikadon. Sed, havante tro impreseblan karakteron, li tro multe suferis morale en sia rolo de „kuracisto por ĉio“; ĉiufoje, kiam li al iu el siaj pacientoj ne povis helpi, aŭ des pli kiam iu el liaj pacientoj mortis, li faris al

si akrajn riproĉojn, ke tio estas la kulpo de lia nebona kuracado; tial post kvarmonata praktikado en la urbeto li decidis elekti por si ian specialecon. Li revenis Varsoviajn kaj komencis tie perfektigi en kuracado de okuloj. Dum duono da jaro li laboris en la okulista apartaĵo de la Varsovia hebrea malsanulejo sub la gvidado de D-ro Kramsztyk. En la fino de 1885 li forveturis en la urbon Plock (kie tiam estis neniuj okulistoj), por provi tie kuracadon kiel okulistoj kaj konvinkiĝi praktike, ĉu li sentas sin jam sufiĉe forta



Sinjorino Zamenhof.

en la okulista scienco. Restinte tie dum 5 monatoj kaj konvinkiĝinte, ke multe ankoraŭ mankas al li, li en Majo 1886 forveturis Vienon kaj dum kelke da monatoj fervore studis tie en la specialaj kursoj por okulistoj. En aŭtuno de 1886 li komencis okulistan praktikadon en Varsovio, en la loĝejo de siaj gepatroj (strato Muranowska Nr. 40).

De 1878 ĝis 1885 Zamenhof multe kaj fervore laboris super sia lingvo. En 1885 li decidis eldoni sian unuan lernolibron kaj komencis serĉi eldonanton. Sed dum du jaroj li tute vane serĉis; malgraŭ ke la libreto estis tre malgranda, neniuj volis ĝin eldoni. Fine en

1887 li sukcesis ricevi prunte kelkan sumon da mono kaj eldoni mem sian unuan libron.

La 9an de Aŭgusto 1887 Zamenhof edziĝis kun fraŭlino Klaro Silbernik (el Kovno) kaj aranĝis sian loĝejon en Varsovio ĉe la strato Przejazd Nr. 9. Lia edzino havis kelkan negrandan kapitalon, kaj la junaj geedzoj havis la plej bonajn esperojn. Sed, malgraŭ la plej modesta maniero de vivado, la kapitaletoj baldaŭ disfandiĝis. Grandan parton de ĝi englutis la eldonado de la unuaj libroj, la anoncado en gazetoj, la dissendado de grandega nombro da senpagaj ekzempleroj al ĉiuj gazetoj de la mondo, al diversaj societoj, lernejoj k. t. p.; la ceteran parton englutis la modesta

vivado de la geedzoj, ĉar la nombro de la pacientoj de Zamenhof estis terure malgranda. En Junio 1888 naskiĝis la unua filo de Zamenhof, Adamo. En la mezo de 1889 el la tuta kapitaletto de la geedzoj ne restis plu eĉ unu kopeko. La bopatro de Zamenhof donis al li kelkan helpon, sed tio, kompreneble, sufiĉis nur por tre mallonga tempo. Tiam en aŭtuno de 1889 Zamenhof vole-ne-vole devis decidi forlasi Varsovion kaj serĉi sian panon en ia alia urbo, kie ne loĝas aliaj okulistoj kaj kie li sekve povus pli esperi laborenspezojn per sia profesio.




1 D-ro Zamenhof; 2 sinjorino Zamenhof; 3 fraŭlino Zamenhof kaj 4 S-ro Adamo Zamenhof, gefiloj de nia majstro.

laŭ fotografajo de P. Fiŝer-Breslau.

La forlaso de Varsovio estis por ambaŭ geedzoj ekstreme dolora, kaj ĉiuj eĉ plej malgrandaj detaloj el tiu malgaja tempo ĝis nun vive restis en ilia memoro. Kvankam ambaŭ geedzoj ne estis naskitaj en Varsovio kaj kvankam ili tre malmulte ĝuis iam la urban vivon, tamen ili tiel varmege amis tiun urbon, ke la devigita forlaso de ĝi estis por ili kvazaŭ plej terura porĉiama ekzilo el la patrujo. Kun treege premita koro la edzino kun la infano forveturis en la urbon Kovno al sia patro kaj la edzo elveturis, por serĉi panon. La unua urbo, en kiu li haltis, estis Brest-Litovsk; sed tie oni klarigis al li, ke la urbo estas tro malriĉa,

por ke specialisto-okulisto povu tie havi eĉ plej modestan panon por sia familio. Tiam li venis en sian urbon de naskiĝo (Bialystok), ĉar, kvankam tie loĝis jam okulisto, Zamenhof esperis tamen, ke la gepatra urbo alportos al li pli da feliĉo. Sed tie oni diris al li, ke la esperoj estas tre malgrandaj, ĉar „Bialystok ne havas konfidon al kuracisto, kiu ne fordonas sin tute al sia profesio kaj okupas sin per aferoj flankaj“. Post kelkaj tagoj da restado en Bialystok Zamenhof aŭdis, ke la granda urbo Ĥerson (en la suda Rusujo) ne havas okuliston. Li telegrafis al unu Ĥersona konato, kaj, ricevinte la respondon, ke tiel efektive estas, li entreprenis la malproksiman vojaĝon al Ĥerson. Li veturis tien kun la plej bonaj kaj viglaj esperoj. Sed, veninte tien, li sciigis, ke la informo, kiun li ricevis, estis malĝusta, ke en Ĥerson loĝas jam delonge okulisto kaj ellabori al si tie medicinan praktikon estos afero tre malfacila. Li tamen decidis jam resti tie kaj pacience provi ellabori al si panon.

La vivo en Ĥerson estis por Zamenhof tre malfacila. Malgraŭ ke li prenis por si tre malgrandan loĝejon (strato Hannibalovska, domo de Tarle) kun tre malriĉa meblaro, kaj servanton li havis nur por kelkaj horoj ĉiutage, la tre malgranda sumo da mono, kiun li kunportis kun si, apenaŭ sufiĉis por unu monato. Ne dezirante akcepti por sia propra persono helpon de sia bopatro (al kiu, kiel ankaŭ al sia edzino, li nenion skribis pri la malfacileco de sia situacio), kaj dezirante elteni kiel eble plej longe, li aranĝis sian vivon tiamaniere, ke liaj elspezoj estu kiel eble plej malgrandaj, ekzemple li hejtis la fornon tre malmulte, tagmanĝis en plej malkara restoracio kaj ne ĉiutage, k. t. p. Malgraŭ la admonado de kelkaj Ĥersonaj konatoj, kiuj ripetadis al li, ke tiel longe, kiel li ne forjetos sian fantaziojn kaj ne fariĝos kuracisto serioza, li neniam havos panon; malgraŭ la akraj riproĉoj, kiujn li ofte mem faradis al si, memorante pri sia edzino kaj infanoj, lia tempo kaj kapo restis okupitaj nur de Esperanto kaj li ne perdis la esperon, ke ĉio estos bona. Al sia edzino, kiu dume naskis la duan infanon, Sofion, li skribadis plej konsolajn kaj esperigajn leterojn. Tamen post kvin monatoj da tre malfacila vivo li fine konvinkigis, ke li plu ne povos elteni. Kaj kiam lia bopatro, diveninte iamaniere la malfacilecon de lia situacio, insistis, ke li akceptu denove lian subtenon kaj reveturu Varsovion, li tion faris, kaj en Majo 1890 li revenis Varsovion, supozante, ke liaj malmultaj pacientoj eble ne forgesis lin, ke eble ankaŭ Esperanto donos al li kelkajn



Trompeter.


enspezajn, kaj ĉio kune, ligite kun la subtenado, promesita de la bopatro, eble donos al li la povon iamaniere elteni, ĝis lia situacio pliboniĝos.

Reveninte Varsovion, li rekomencis sian medicinan praktikadon ne malproksime de sia antaŭa loĝejo, en la domo Nr. 21 de la strato Nowolipki; esperante havi kelkan helpan profiton, li prenis sur sin la eldonadon de la tiama gazeto „Esperantisto“, kiun la ĝistiamaj eldonantoj ne deziris daŭrigi. Sed la gazeto donis nur malprofiton, kiun kovri li ne povis; tial, sensukcese provinte aranĝi malgrandan akcian societeton,

Zamenhof estis devigita anonci, ke li plu ne povas eldoni la gazeton. Tiam kun sia helpo aperis Trompeter, kiu ne sole prenis sur sin la eldonadon de la gazeto, sed ankaŭ destinis por Zamenhof pagon de 50 rublojn ĉiumonate por la redaktado.


Tamen la nombro de la pacientoj de Zamenhof ĉiam estis ankoraŭ terure malgranda, kaj Zamenhof venis al la konvinko, ke en granda urbo li neniam povos sin teni. Tre malgaje la geedzoj decidis denove forlasi Varsovion kaj serĉi feliĉon en urbo negranda. Ĉar oni diris al li, ke la urbo Grodno estas sufiĉe granda, por doni panon al unu okulisto, kaj ĉar lin tre allogis la ideo vivi denove en la provinco, en kiu li naskiĝis, Zamenhof forveturis tien en oktobro 1893, por provi tie okulistan praktikadon. La komenco estis sufiĉe bona. Tial la 25an de novembro Zamenhof revenis Varsovion, por preni sian familion, kaj la 27an, en malgaja nebula tago, la geedzoj Zamenhof kun siaj du infanoj forlasis Varsovion, ŝajne jam por ĉiam. En la stacidomo diris al ili adiaŭ nur la patro kaj gefratoj de Zamenhof (la patrino mortis antaŭ unu jaro); el la amikoj aŭ konatoj estis neniuj.

Kvar jarojn la familio Zamenhof loĝis en Grodno. La unua tempo estis sufiĉe bona. La enspezoj estis ne grandaj, sed tamen sufiĉis por modesta vivado. Sed



Einstein.

baldaŭ en Grodno enloĝiĝis alia okulisto, kaj la vivo fariĝis pli malfacila, ĉar Grodno ne sufiĉis por du okulistoj, kaj por „konkurado pro pano“ Zamenhof ne estis kapabla. Zamenhof denove devis akceptadi helpon de sia bopatro. Kvankam la lasta donadis sian helpon tute volonte kaj sen riproĉo, Zamenhof tamen morale multe suferis de tio. La afero Esperanta ankaŭ iris tre malfacile. Pro artikoloj de Tolstoj, presitaj en la gazeto „Esperantisto“, la rusa cenzuro malpermesis al ĝi la eniradon en Rusujon, kaj la



Grafo Leo Tolstoj.

ĉiam pli kaj pli malfacila, kaj konvinkiĝinte, ke li nenie kaj neniam havos sian panon, se lia kapo estos fordonita ekskluzive al Esperanto, Zamenhof fine decidis fari la lastan provon. La decido estis por li tre turmenta, ĝi minacis pereigi la tutan esencon de lia vivo, sed li sentis tre bone, ke li nepre devas fari tiun provon, ĉar alie restas por li absolute nenia espero. Li decidis tute formeti de si por 2—3 jaroj la aferon Esperantan (daŭrigante sole la eldonadon de la „Adresaroj“ kaj la plej necesan korespondadon) kaj dediĉi sin tute kaj ekskluzive al sia profesio. En Aŭgusto 1897 li forveturis

gazeto, kies plimulto da abonantoj estis tiam Rusujanoj, devis malaperi. La „Biblioteko de Esperanto“, kiun Zamenhof tiam eldonadis, ne havis sufiĉe da abonantoj, por kovri la elspezojn. Kun konstante streĉita cerbo Zamenhof serĉadis ian pandonan okupon por si kaj iun personon, kiu volus preni sur sin la daŭrigon de la Esperantaj eldonoj. Sed neniu volis ion aŭdi pri tio. Fine s-ro Gernet el Odeso prenis sur sin la eldonadon de la gazeto (sub ŝanĝita nomo) kaj de la Biblioteko.

Vidante, ke la vivo en Grodno fariĝas por li

Vienon, por iom refreŝigi siajn medicinajn sciojn, kaj en Novembro li kun sia familio denove transloĝiĝis Varsovion. Li tie luis loĝejon en la plej malriĉa kvartalo de Varsovio (strato Dzika No 9, kie li loĝas ankoraŭ nun), kie neniu kuracisto-specialisto iam loĝis, ĉar la pacientoj tie pagas tro malmulte kaj pli bonstataj personoj ne volas tien veni. Li komencis akceptadi la malriĉajn pacientojn, dediĉadi al ili sian tutan atenton, por akiri ilian konfidon; li penis per ĉiuj fortoj, ke oni forgesu, ke li estas aŭtoro de ia lingvo, ke oni vidu en li nur kuraciston.

Estas tute kompreneble, ke, malgraŭ ĉia penado, la unua tempo ne povis ankoraŭ doni ian bonan rezultaton. Sed Zamenhof konsciis, ke por li tio estas la lasta, absolute la lasta provo, ke se li nun ne sukcesos, li havos plu nenian esperon en la vivo. Tial liaj nervoj estis tiam terure ekscititaj kaj li fariĝis preskaŭ freneza. Ŝajnis al li tiam, ke tio estas la lastaj tagoj de lia vivo. Ĉiuj penoj de lia familio, por konsoli lin, estis vanaj. Ĉiumonate li devis akcepti de sia bopatro kelkan sumon da mono, kaj ĉiufoje tio estis por li infera sufero. Ĉar en Grodno liaj enspezoj estis pli grandaj kaj liaj elspezoj pli malgrandaj, tial li konstante faradis al si akrajn riproĉojn, kial li forlasis Grodnon. Al la suferoj financaj aliĝis ankoraŭ nostalgio, ĉar post kvarjara vivado en la provinco de sia naskiĝo Zamenhof jam ne sentis sin en Varsovio tiel hejme, kiel antaŭe. De tempo al tempo li penadis konvinki sin mem, ke li tute ne faris la „frenezan“ transloĝiĝon, ke ĉio estas sonĝo, ke li baldaŭ vekigĝos kaj vidos sin denove en sia Grodna loĝejo ĉe la strato Policejska.

Sed post la paso de unu jaro la cirkonstancoj fine komencis pliboniĝi. La nombro de la pacientoj de Zamenhof komencis regule kreski. Fine en la jaro 1903 Zamenhof atingis tiun feliĉan momenton, kiam liaj enpezoj jam tute kovris liajn elspezojn, kiam li kun ĝoja koro povis diri al sia bopatro: „mi plu ne bezonas helpon“, kaj kiam li denove kun tute pura konscienco povis komenci energian laboradon por Eperanto. Tio estis eble la plej feliĉa jaro en la vivo de la geedzoj Zamenhof. En la jaro 1905 Zamenhof havis jam la eblon (la unuan fojon post 20 jaroj) fari al si kelksemajnan liber-tempon kaj entrepreni kun sia edzino vojaĝon al la Bulonja kongreso.

Nun la vivo de Zamenhof estas jam trankvila. Li laboras tre multe, ĉar lian tutan tagon okupas lia profesio kaj la tutan vesperon li laboras por Esperanto. Sed malgraŭ lia granda laborado

kaj malgraŭ la malbona stato de lia sano (malforteco de la koro kaj manko de pulso en la piedoj) li estas tute kontenta. Li nur bedaŭras, ke lia tagnokto havas ne pli ol dudek kvar horojn kaj la manko de tempo kaj la malbona sano ne permesas al li plenumi ĉion, kion li volus plenumi.

Leono Zamenhof.

□□□□□□□□
△ △ △

Historiaj detaloj.

Originale verkis Adam Zakrzewski.

Miaj amikoj faris al mi reputacion de historiisto de Esperanto, kvankam miaj historiaj laboroj, krom du malgrandaj broŝuroj, limigis sin ĝis nun precipe nur al kolektado de materialoj. Tamen, certe pro tiu kaŭzo, mi ricevas iafoje demandojn, rilatantajn al la unua epoko de esperanta movado, al malnova bibliografio k. t. p.

Antaŭ kelkaj tagoj unu samideano el Kijev skribis al mi: „kiam aperis la unua esperanta lernolibro? en kia lingvo ĝi estis skribita? kia estas nacieco kaj religio de D-ro Zamenhof? mi nepre bezonas pri tiuj demandoj sciigojn el fonto kiel eble plej kompetenta, ĉar mi jam aŭdis multajn respondojn tre diversajn kaj tute malsamajn. Unuj diras, ke la lernolibro aperis en majo 1887

en lingvo rusa (Georg Davidov), aliaj — ke ĝi estis skribita pole kaj aperis en julio. Ankoraŭ pli diversaj opinioj ekzistas pri nacieco de D-ro Zamenhof: Grabowski ĉiam uzas esprimojn: „nasz rodak“ (= nia naciانو), „Polska, ojczyzna Esperanta“ (= Polujo, patrujo de Esperanto). Samtempe Francoj nomas la aŭtoron de Esperanto — rusa kuracisto, aliaj nomas lin — hebreo k. t. p. Ĉar ĉiuj tiuj demandoj estas interesaj por la historio de Esperanto, ne rifuzu trankviligi scivolemon de niaj Kijevaj esperantaj samideanoj“

Д-р ЭСПЕРАНТО.

МЕЖДУНАРОДНЫЙ
ЯЗЫКЪ.

ПРЕДИСЛОВІЕ
и
ПОЛНЫЙ УЧЕБНИКЪ.

□ рог Русој □

Чтобы книга была всемирна, не достаточно назвать ее такими.

Цена 15 копекъ.

ВАРШАВА.

Типо-Литография Х. Кельтера, ул. Новольна № 11.
1887.

Titola paĝo de la unua broŝuro.

Ĉar samaj demandoj estas certe interesaj por multaj esperantistoj, mi ripetas tie ĉi mian respondon al mia Kijeva korespondanto.

Unua esperanta lernolibro, t. e. la unua esperanta presajo, aperis en julio 1887 en Varsovio, sed en lingvo rusa, ĉar tiam estis multe pli facile ricevi aprobon de cenzuro por rusaj ol por polaj skribaĵoj; la dato de tiu ĉi aprobo, ĉiam nepre presata ruse sur la dua paĝo de ĉiu libro, estis: 21-a de majo 1887 laŭ rusa kalendaro (t. e. 1-a de junio).

La unua broŝuro estis do rusa. Ĝia plena titola paĝo en esperanta traduko estis: D-ro Esperanto. Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro. Por Rusoj. Varsovio. Tipo-Litografejo de Ĥ. Kelter, str. Nowolipie No. 11. 1887. La titola paĝo montras krom tio la devizon: „Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia.“ La prezo de la libro estis 15 kopekoj.*)


Nur pli ol unu monato poste, la 9an de julio 1887 (t. e. la 21an,**) la cenzuro aprobis polan broŝuron, kies titolan paĝon ni prezentas al niaj legantoj.

La dua demando pri nacieco de nia majstro estas iom pli malfacila. Se la nacieco de ĉiu devas esti difinita laŭ lia propra interna subjektiva sento, tiam, ŝajnas al mi, ke Zamenhof konsideras sin mem kiel „internacianon“ aŭ „eksternacianon“: homaranon, t. e. „anon de homaro“ — kiel li mem nomis sin unufoje.

Sed por klarigi tiun ĉi demandon el objektiva vidpunkto, — ĉar tio interesas la demandantojn, — mi devas rememorigi kelkajn biografiajn detalojn.

*) La rusan titolan paĝon vidas niaj gelegantoj en tiu ĉi numero laŭ fotografajo.

**) Mi citas datojn de cenzuro, ĉar preciza tago de eliro el presejo estas jam neeble difini. La librejo Istomin en Varsovio ne ekzistas jam de dek jaroj.



Titola paĝo de la pola eldono.

Marko Zamenhof, la patro de la aŭtoro de Esperanto, devenis el pola urbo Tykocin. Poste li longe loĝis en la urbo Bialystok, kuŝanta ankoraŭ en pola etnografia teritorio (ĝis jaro 1815 ĝi apartenis al Polujo), sed jam sur ĝiaj limoj, en Grodna gubernio.. En tiu ĉi urbo — naskiĝejo de Zamenhof — la loĝantaro estis tre miksitita en nacia rilato, kiel en ĉiuj urboj de la grandega regiono inter Polujo kaj centra Rusujo de la Baltika ĝis Nigra maroj, t. e. en Litovujo, Blankrusujo, Baltiklando, Ukraino. Laŭ statistiko de la jaro 1897 — unua kaj sola, en kiu estis kolektitaj sciigoj pri nacieco de la loĝantaro en Rusujo, — la urbo Bialystok el 61812 loĝantoj kalkulis: 40759 hebreojn, 11239 polojn, 4795 rusojn, 3616 germanojn, 1219 blankrusojn.*) Tio ĉi, kiel ni scias, havis grandan influon sur la junan Zamenhof kaj elvokis en li fortan senton pri neceseco de lingvo internacia. En tiu epoko de lia vivo lia nacieco estas malfacile difinebla. Nur poste, kiam lia patro ekloĝis en Varsovio, tiam certe la lingvo pola fariĝis hejma en lia familio. Malgraŭ do la suprecitata teoria vidpunkto, objekte oni devas konsideri nian Majstron kiel Polo. En lia hejmo, en rilatoj inter membroj de lia familio k. c. oni parolas pole. Liaj pli junaj fratoj, naskitaj kaj edukitaj jam de infanaj jaroj en Varsovio, estas Poloj.

Kial do francaj esperantistoj nomas D-ron Zamenhof — „rusa kuracisto?“ La kaŭzo estas klara: ĝi devenas de la konata kaj tiel karakteriza por Francoj nekono de fremdaj lingvoj. Ili simple estis erarigitaj de la finiĝo of, kiun ili prenis por analogia al finiĝoj de rusaj nomoj, kiel Lermontof, Ivanof, Nelidof. Sed la nomo „Zamenhof“ havas evidente nenion komunan kun tiuj ĉi cititaj. Ĝi devenas de pure germanaj radikoj kaj etimologie eĉ devus esti skribata: Sa menhof; nur ĝia pola fonetika transskribo estas: Zamenhof.

Oni povas certe nomi D-ron Zamenhof „Rusujano“, kiel 108 milionojn de aliaj „anoj“ de 89 nerusaj nacioj, loĝantaj en nunaj limoj de Rusa Imperio. Sed tiu ĉi nomo, en ĝia esperanta signifo, ne montras naciecon, sed nur apartenon al regno aŭ ŝtato.

Pri la sekvanta demando ne povas jam ekzisti ia ajn dubo. Grabowski havis plenan rajton skribi kaj diri: „Polujo — patrujo

*) 66% hebreoj, 18% poloj, 8% rusoj, 6% germanoj, 2% blankrusoj. Tiuj ciferoj koncernas lingvojn; divido de la loĝantaro laŭ religioj estas iom alia. El 41903 Izraelidoj 836 montris lingvon rusan kiel sian patran, 28 — polan, 64 — germanan, ceteraj — hebrean.

de Esperanto", ĉar pri nacia karaktero de malnova pola ĉefurbo Varsovio, ankaŭ ia ajn dubo neniam ekzistis.

Fine, al la lasta demando mi ne povas respondi. Mi neniam demandis D-ron Zamenhof, kia estas lia religio. Mi konis lin ĉiam kiel homon saĝan, nobelan kaj honestan en ĉiuj pensoj kaj agoj, penetritan de varma amo al homoj; tio al mi sufiĉis. Ni neniam tuŝis religiajn demandojn. El liaj vortoj ŝajnas iafaje, ke li estas Diisto. Sed tio estas nur simpla mia supozo.

Adam Zakrzewski.



Firmo Hachette kaj Esperanto.

Krom kelkaj libroj eldonitaj diversloke, preskaŭ ĉiuj unuaj esperantaj verkoj estas presitaj ĉe la germana firmo Tümmel en Nürnberg. Sed Tümmel ne estis propramova kaj propramona eldonisto; li estis nur presisto, kaj la financaj riskoj estis elportitaj de Doktoro Zamenhof, de la unuaj germanaj propagandistoj, Einstein kaj precipe Trompeter, de S-ro Anton Grabowski, kaj aliaj. Post la mortoj de Einstein kaj Trompeter, la malapero de la gazeto „La Esperantisto“, la momenta senkuraĝiĝo de S-ro Grabowski, la presadoj ĉe Tümmel subite ĉesis.

Do, ĝis la jaro 1900, neniu eldonisto sin interesis pri Esperanto, neniu volis preni sur sin la publikigon de necesegaj lernolibroj kaj vortaroj, kaj la malmultaj, maldikaj, broŝuroj esperantaj estis nur eldonadoj de sindonaj privatuloj.

En tiuj malfacilaj cirkonstancoj okazis



Profesoro Hachette, fondinto de la firmo Hachette.

grava fakto: en komenciĝo de la jaro 1901 S-ro P-ro Bourlet, altirita al Esperanto de sia eminenta kolego P-ro Charles Méray, fariĝis agema Esperantisto. Kun sia konata praktika sento, li tuj komprenis, ke antaŭ ĉio necesas, ke nia lingvo estu subtenata de bona eldonisto, kaj li, tiucele, klopodis. Kiel aŭtoro de multaj matematikaj verkoj eldonitaj ĉe la firmo Hachette, ankaŭ kiel persona amiko de S-ro Bréton, unu el la estroj de ĉi tiu firmo, li sin turnis al ĝi kaj sukcesis, cetere ne facile, ĝin decidigi al eldonado de esperantaj libroj.

P-ro Bourlet, estante tiam nur kelkmonata Esperantisto, juĝis sin ne sufiĉe kompetenta por konduki mem tiun aferon. Li venigis Parizon S-ron de Beaufront, interrilatigis lin kun la firmo Hachette kaj poste lasis lin aranĝi libere, tute sola, la materiajn kaj moralajn kondiĉojn de la eldono.

En 1901, Hachette komencis la publikigon de francaj lernolibroj, unue verkitaj de S-ro de Beaufront kaj poste de P-ro Cart, kaj dank'al tiuj libroj la disvastiĝo de Esperanto en Francujo rapide kreskis. Baldaŭ la bezono eksentiĝis helpi la propagandon ekster Francujo. S-ro de Beaufront kaj liaj amikoj tiam opiniis, ke por tio plej simple estus, se la firmo Hachette eldonus mem ĉiulingvajn lernolibrojn kaj vortarojn, kaj kompreneble prefere tradukojn de la Beaufront'aj verkoj. Por pravigi tiun ideon, oni citis la ekzemplon de Baedeker. Sed S-ro Bourlet kaj la firmo Hachette opiniis malsame. Ili asertis, ke tiu agmaniero estus malbona por Esperanto, ke tiel la publiko imagus, ke Esperanto estas ia librista afero, ia francaĵo. Ili do kontraŭe volis, ke en ĉiu lando estu almenaŭ unu nacia eldonisto de esperantaj lernolibroj, ne tradukitaj, sed verkitaj de enlandanoj. Por tion efektiviĝi, malgraŭ la kontraŭstaro de de Beaufront, S-ro Bourlet vojaĝis, meze de la jaro 1902, Germanujon por tie serĉi eldoniston. Li ne sukcesis; sed, reveninte, por pli bone povi plenumi sian planon, li deziris ekkoni la materiajn kondiĉojn aranĝitajn de de Beaufront. Tiam, kaj nur tiam, li legis la kontraktojn, kiujn faris tiu ĉi kun Zamenhof kaj Hachette. Kun granda surprizo, li konstatis, ke tiuj kontraktoj ne nur estis ĉefe profitdonaj al unu sola persono, nome al S-ro de Beaufront, sed plie, ke ili metis preskaŭ la tutan sorton de nia lingvo en la manojn de la tiama Prezidanto de la Franca Societo. Tio estis tre riskoplena, kaj, interkonsente kun la firmo Hachette kaj D-ro Zamenhof, S-ro Bourlet energie klopodis por neniiĝi tiujn danĝerajn kontraktojn.

Post longa penado, li sukcesis ilin disŝirigi, kaj, en la komenciĝo de la jaro 1903, ili estas anstataŭigitaj de unu sola kontrakto senpere inter Hachette kaj nia Majstro.

Ĉar oni ofte parolis pri tiu fama kontrakto kaj preskaŭ ĉiam diris pri ĝi malĝustaĵojn, ŝajnas al ni utile klarigi per kelkaj vortoj ĝian esencon.

Laŭ tiu papero, D-ro Zamenhof elektis la firmon Hachette, kiel preferan eldoniston de siaj propraj verkoj kaj de la verkoj surportantaj la surskribon „Kolekto aprobata de Doktoro Zamenhof“. Reciproke, la firmo Hachette: 1^o promesis pagi taŭgajn honorariojn al la aŭtoroj, 2^o estis devigita eldoni nur verkojn esperantajn aprobitajn de D-ro Zamenhof, 3^o estis devigita eldoni mem aŭ eldonigi, antaŭ difinita templimo, lernolibrojn kaj vortarojn en ses aŭ sep el la ĉefaj eŭropaj lingvoj.

Tiu lasta punkto estis gravega. Ĝis tiam Esperanto staris antaŭ malfacile solvebla dilemo: unuflanke la lingvo ne disvastiĝis kaj ne ekzistis Esperantistoj, ĉar mankis lernolibroj, sed aliflanke la eldonistoj ne volis presi, je sia propra risko, lernolibrojn, ĉar ekzistis neniu legantoj. La kontrakto kun Hachette fine solvis la demandon. Nun oni ne plu atentis, ĉu ekzistas Esperantistoj aŭ ne, ĉu la libroj estos aĉetataj aŭ ne, la firmo Hachette estis ĉiokaze devigita publikigi la necesajn studlibrojn. Konforme je sia propra opinio, por plenumi sian devon, ĝi ne eldonis mem la nefrancajn librojn, sed turnis sin al nefrancaj eldonistoj, kiujn ĝi morale kaj finance subtenis. Tiel, sinsekve, ĝi ligis amikajn interrilatojn kun la firmoj Stead en Londono, Möller & Borel en Berlino, Espasa en Barcelono, Giusti en Livorno, Arct en Varsovio, k. t. p. Tiamaniere la diverslandaj eldonistoj, riskante nenion aŭ malmulton, povis provizi siajn samlandanojn per propagandiloj kaj lernolibroj, ĝis venos la tempo, kiam Esperanto estos sufiĉe disvolviĝinta, por ke ili ne plu bezonu la kunhelpon de Hachette.

Oni do komprenas, kian grandan signifon tiu kontrakto kaj la kuraĝa sindono de Hachette al Esperanto havis por nia lingvo. Mirinde estas, sekve, ke troviĝis sendankaj Esperantistoj, kiuj, kvankam bone konante tiujn servojn, akre batalis kontraŭ la firmo Hachette.

En fino de Julio 1905, unu monaton antaŭ la unua Kongreso de Esperanto, subite eksplodis fortegaj atakoj. Kunligante la demandon pri fondo de Internacia Ligo, proponita de D-ro Zamenhof, kun

la libristaj aferoj de Hachette, oni disvastigis inter la Esperantistaro la famon, cetere tute maljustan, ke en tiu projekto troviĝas „kaŝita glavo, kiu minacas Esperanton, minacas la tutan aferon de helpa lingvo, je mortiga bato“. Oni diris, ke „kelkaj homoj profitis sian apartan situacion kaj la izolecon de D-ro Zamenhof, por iom post iom agadi sur la spiriton de la aŭtoro de Esperanto, kaj puŝadi lin sur la vojon, kie li servos privatajn interesojn“. Oni certigis, ke la firmo Hachette volas kapti tutan Esperanton kaj trudi sian monopolon al ĉiuj; kaj de tiu tempo datumas tiu nemeritita famo, ke Zamenhof estas katenita de ia monopolo de Hachette. Kion



Ĉefa enirejo de la firmo Hachette en Parizo, 79 bulv. Saint Germain.

ni diris supre, jam montras la malĝustecon de tiuj rakontoj. Zamenhof ne estas katenita, sed tute libera; neniam la firmo Hachette sin enmiksis en la esperantistajn aferojn, neniam ĝi esprimis eĉ la plej malgrandan deziron al nia Majstro, ke li konduitu iamaniere. Ĉiuj Esperantistoj estis ja tiam liberaj eldoni siajn verkojn sub sia persona respondeco, kiel ili nun estas ankoraŭ. Eĉ la fama „Kolekto aprobita“ ne estis verdire monopolo, ĉar Hachette havis nur la preferon de elekto, kaj se tiu firmo rifuzis eldoni verkon aprobitan de Zamenhof, la aprobita aŭtoro havis rajton sin turni al tiu eldonisto, kiu plaĉis al li.

— En tiaj kondiĉoj, kial do — eble vi diros — la firmo Hachette ne tion publike sciigis, kaj kial ĝi ne tuj konigis la malverecon de tiuj asertoj?

La respondon al tiu demando donis P-ro Bourlet en unu el siaj „Babiladoj“ en „La Revuo“ (Januaro 1911), en kiu li aludis tiujn tre bedaŭrindajn faktojn. Li diras:

„Kion fari en tiaj cirkonstancoj? Se tiuj, kiuj bone konis la tutan demandon, kontraŭstarante la bruemulojn, kun skribitaj pruvoj kaj dokumentoj en manoj, venus publike konigi la veron, tio certe naskus neimageblan konfuzon. La Unua Kongreso de Esperanto ne eviteble fariĝus interfrata batalado. Por eviti tiun skandalon, por la bono de Esperanto, kiun ili lokas super ĉia persona intereso, Zamenhof kaj la aliaj atakitoj silentis.“

Post la Kongreso en Boulogne, Zamenhof, por haltigi tiujn malpravajn atakojn, decidis, ke li ĉesigos la „Kolekton aprobitan“. Li liberigis la firmon Hachette de ĝia promeso, ke ĝi eldonos nur verkojn aprobitajn de li, kaj siaflanke li ne plu donis aprobon al iu ajn verko. La rezultato de tiu batalo estas do jena: unuparte la aŭtoroj, kiuj deziris esti kontrolitaj de Zamenhof, perdis tiun helpon; kaj aliparte D-ro Zamenhof perdis la malgrandajn profitojn, kiujn li ricevis de la „Kolekto aprobita“.

Liberiĝinte de la deviga aprobo, la firmo Hachette profitis sian liberecon por ankoraŭ pli energie kaj pli taŭge labori por la bono de Esperanto. Ĝi fondis „La Revuo'n“ kaj komencis eldonon de multaj literaturaj kaj tehnikaj verkoj. Ĉiu, kiu eldonis tiajn librojn, tre bone scias, ke ili ne vendiĝas sufiĉe, por ke la enspezoj kompensu la elspezojn. Kiel ekzemplon, ni citos la fakton, ke la unua eldono de „Faraono“, la ĉefverko de Kabe, ne estas ankoraŭ elvendita. La esperantista popolo estas ja ankoraŭ en infaneco, ĝi lernas, sed ne legas, kaj, krom kelkaj klasikaj legolibroj, ĉiuj literaturaj aŭ tehnikaj verkoj restas sur la bretoj en la magazenoj. Tion la firmo Hachette sperte sciis, kaj tamen ĝi kuraĝe daŭrigis sian eldonadon, por helpi nian lingvon. Tiel aperis la novaj verkoj de nia Majstro, la Rabistoj, la Revizoro, Georgo Dandin, Ifigenio, Marta kaj ceteraj, la multaj kaj gravaj tradukoj el la Biblio; tiel aperis la belaj tradukoj, faritaj de niaj plej lertaj samideanoj, Faraono, Aspazio, Makbeto, la Reĝo de l' Montoj, Mistero de Doloro, Eneido k. t. p. Tiel aperis la Anatomia,

Matematika, Marista, Muzika Terminaroj, la tehnikaj Vortaroj de Verax, kaj ni ekscias, ke ĵus aperis Farmakopeo en naŭ lingvoj.

Vidante tiun senĉesan produktemon, trompitaj ankaŭ de malveraj diroj, kelkaj Esperantistoj supozas, ke la firmo Hachette gajnas monton da oro per siaj eldonaĵoj, kaj la vero estas, ke ĝi certe multon malgajnas. Se hodiaŭ tiu ĉi firmo starigus la plenan kalkulon de ĉiuj en-kaj elspezoj, kiujn ĝi faris por Esperanto, la fina bilanco estus certe malprofito.

Hachette kondutis kontraŭ Esperanto ne kiel profitama komercisto, sed kiel sindona propagandisto. Ĝi ne fanfaronas pri sia rolo, ĝi ne sin prezentas, kiel unike esperanta entrepreno, ĝi ne en gazetoj donas al si mem laŭdojn, sed ĝi silente, senbrue, persisteme, helpadas al nia afero. Neniu estas, kiu, sin turninte al la firmo Hachette, por peti de ĝi helpon, ne ricevis afablan respondon kaj plej ofte efektivan subtenon. Kiam oni senpasje studas la historion de Esperanto, oni neeviteble alvenas al la konkludo, ke la rolo de la firmo Hachette estas tiel grava, ke oni rajte povas sin demandi, ĉu Esperanto nuntempe ankoraŭ ekzistus sen tiu „firma“ apogo.

Ni esperas, ke niaj legantoj komprenos, ke nur nia plena senpartieco puŝis nin esprimi ĉi tie nian sinceran admiron al la bela konduto de Hachette kaj nian koran dankon pro ĝia oferema agado.

Ni ŝuldis al tiu ĉefa propagandisto de nia lingvo, ke, almenaŭ unu fojon, ni rakontu la veran historion kaj la veran rolon de Hachette en Esperanto, kaj ni supozas, ke niaj legantoj aplaŭdos nin pro tio, kaj ke estonte ili havos al Hachette la dankajn sentojn, kiujn ĝi meritas de la tuta Esperantistaro.

ooo ooo ooo

Sur lir' dukorda.

(Kelkaj impresoj.)

Dukorda liro? . . . Tial zumi

Kaj tinti adasiste mem.

Mi devas? — Kordoĵn havas du mi,

Sed fingrojn kvin por kordekprem'!

A. Grabowski. (Sur unu kordo.)

Nia jarcento ne tre favoras poezion. Okupitaj per zorgoj por ĉiutaga pano, ni perdiĝas en klopodoj de griza vivo kaj, se restas okaze ia ora tempmonero, ni ŝanĝas ĝin je spesoĵ de etaj ĝuoj,

kiuj devas nin momente distri, nerve eksciti kaj igi nin forgesi tiujn jugojn de l'vivo . . . Nia jarcento ne tre favoras poezion! Tro rapide ni vivas, tro mallonga fariĝis nia spiro, kiu tiel jam alktumigiĝis al fabrika fulgo kaj aŭtomobila benzino, ke pura aero jam eĉ malutilas al la brusto. Kaj se la revuoj „dediĉitaj al literaturo kaj arto“ presigas ankoraŭ poemojn, do nur pro tio, ke por mil abonantoj troviĝas ankoraŭ unu grumblulo, kies „strangan guston“ oni devas ja kontentigi, kaj pro tio, ke ili prezentas bonegan materialon por ŝtopi eventualajn truojn kaj truetojn sur la margenoj. Nia jarcento ne tre favoras poezion! Ĉar ankaŭ al nuntempaj poetoj mankas pli longa spiro. Fabrika fulgo ankaŭ iliajn kovris animojn -- ĉu mirinde? ili ja sur mansardoj loĝas, tute proksime al la kamentuboj. Do se ili ĝin por momento forviŝos, ĝi baldaŭ denove falas sur ilin. Restas nur tiel malmulte da tempo, ke ili povas mallongan kanteton ĵeti al la mondo . . . La cindro de l'vivo jam ree kovras la animon.

Ĉu ĉie, ĉu en la tuta mondo tiaj regas rilatoj? Ĉu jam tute pereis sento por poezio? Jes, preskaŭ ĉie. Sed ne ankoraŭ en tiuj socioj, kiuj de la tiel nomata civilizita mondo ne prenis ankoraŭ tutan ĝian civilizon, kulturon, aŭ kiel ajn oni nomos tiun ĉi fulgon kaj ŝimon kaj cindron kaj benzinodoron. Kaj feliĉe ne ankoraŭ en Esperantujo. Ĉar ĝi eĉ vivi plenkonscie ankoraŭ ne komencis. Do kvankam estas individuoj, kiuj asertas, ke, ĉar Esperanto, kiel Minervo, plenkreska elsaltis el la kapo de Zeŭso-kulturo kaj tial portas jam ĉiujn signojn de l' tutpreta matureco kaj maljuneco, per kiu nia kulturo distingigĝas -- do, ke la poezion esperantan oni ankaŭ same devas trakti, kiel oni traktas la poezion en la tuta mondo civilizita, la vivo iliajn asertojn refutas kaj neas.

Antaŭ nelonga tempo iu montris al mi poŝtkarton-respondon de unu esperanta redaktejo: . . . „Koran dankon por via afableco. Viaj poemoj estas unuj el la plej belaj, kiujn ni legis. Ni ilin presigos. Sed ne ofendiĝu, se Vi iom atendos, ĉar ni ne ankoraŭ scias, kiam. Da poezia materialo ni havas jam provizon por kelkaj jaroj . . .“ Karakteriza dokumento! Ĉi montras la ĵus supre aluditan postenon, kiun rilate al poezio okupas certaj rondoj dirantaj seke: atendu, kaj montras la freŝon kaj vivkapablon de esperanta poezio, kaj montras, ke en multaj vejnoj esperantaj varma, pure-ruĝa sango pulsas kaj ke en multaj brustoj novaj arioj sonas pri „nova sento“.

Ĵus mi tralegis libreton: „Unuaj agordoj . . .“ Poezioj de Viktor Elski kaj Eska¹⁾. Al longa litanio: Bicknell, Devjatnin kaj Frenkel, Privat kaj Myslik, Sentis kaj Kolovrat, Hankel kaj Jones kaj tiom da aliaj aliĝas du novaj nomoj aŭ pli verŝajne pseŭdonimoj.²⁾ Unu, Eska, estas jam al ni iom konata: liaj melankoliaj kantoj aperadis iafoje en „Lingvo internacia“, „Ondo de Esperanto“, „Universo“, „Juna Esperantisto“. La nomo de l' dua estas por ni surprizo; ni ĝin nenie ankoraŭ renkontis. Kiuj ili estas, de kie, kion alportas? Ni provu deĉifri ilian devenon, diveni iliajn pensojn . . .

* * *

Ho, kiel belega
La pola vilaĝo,
Kiun mi memoras
De mia fruago . . .

La pola vilaĝo ilin naskis, pola kamparo kun „tritikoj, sekaloj“ al ili murmuris misterojn de l' patrolando, polaj betuloj kaj salikoj lulkantis al ili ariojn de Chopin'aj mazurkoj, „ĝem' de l' mallibero“ vekadis el dormo-malkonscio. Kaj ili ekamis tiun ĉi teron pollandan, kun ĝiaj „montetoj kaj valoj kaj verdaj arbaroj“, ekamis ĝin, kiel nur infano malgranda ami povas:

Mi amas ĝin per forto,
Kun ĉiu ĝia sorto,
Kun ĝem' de l' mallibero,
Mi amas vin, poltero,
Per tuta mia kor'.

Ili rakontas al si pri tiu ĉi tero pollanda, aŭ eble pli verŝajne la pli serioza kaj malproksimen rigardanta Eska rakontas al sia juna kunulo, kion al li la vento murmuris kaj suno konfesis, kiam li ilin petis, ke ili la larmojn sekigu.


Dum unu el tiaj rakontoj kaj interparoloj, kiam vespere

subiris hela suno,
Nokt' arbaron ĉirkaŭpremas,
De la vento arboj tremas —
Lumigitaj per la luno . . .

ekbrilas ia nevidita ĝis nun stelo sur la malhelaj lazuroj, aŭdiĝas muziko ĝis nun neaŭdita, ĥoro milvoĉa, potenca, kvankam mal-

¹⁾ Lodz. St. Miszewski. — 96 paĝoj. — Prezo 0.20 Sm. Pli bela eldono 0.30 Sm.

²⁾ Laŭ niaj informoj „Eska“ estas la pseŭdonimo de Stanislav Karolczyk, „W. Elski“ de Stanislav Braun. Noto de l' redakcio.



Eska (Stanislaw Karolczyk).

proksima ankoraŭ . . .
melodio kvazaŭ iom
malkuraĝa, sed jam
duontriumfa, kvazaŭ
paca, tamen la ŝim-
kovritajn „murojn de
miljaroj“ skuanta . . .
Sed kie ĝi sonas? En
tiuj kamparoj silentaj,
ĉu en la salikoj apud-
vojoj, mallaŭtan preĝon
murmurantaj, ĉu eble
en propra nur koro,
aŭ tie el altaj lazuroj
ĝi fluas, aŭ ie el vasta
tutmondo?

Ne scias ankoraŭ
la junuloj, sed jam la
melodio ilin kaptis kaj
ekregis, ekposedis iliajn
korojn. Ĉi estis res-
pondo al iliaj duboj kaj
malkvietoj, suferoj kaj
doloro, larmoj kaj
mirinda? Ne! Ili ja:

„ĝem' de l' mallibero“ . . . Ĉu tio estas

En revoj . . . en regno vivadis,
En kiu sencese ĝoj' ĉie regadis,
En revoj . . . feliĉon ekvidis,
Sur gajaj vizaĝoj, el kiuj helidris

De l' vivo plenguo,
De l' amo elfluo,

De l' amo senĉesa, konstanta, komuna . . .

Do ili prenas siajn lirojn dukordajn kaj migri komencas por trovi
la fonton de tiu ĉi melodio potenca kaj triumfa, paca kaj tamen
la korojn skuanta, por trovi la ĥoron milvoĉan kaj ĝin per siaj
ankaŭ voĉoj plifortigi. Kaj antaŭ ol ili tien alvenis, jam ili ekamis
la ideon, kiu la melodion naskis, antaŭ ol ili alvenis, jam siajn
amikojn ili instigas:

Al agado, al laboro!
Kvankam ĉie malfavoro,

Kvankam homoj nin ne fidas,
Nek la celon nian vidas.

Al agado, al laboro
Kun kuraĝo en la koro!
Malgraŭ baroj sur la vojo,
Stel' espera nia ĝojo.

Fine ili alvenas al la samideanaro. Sed, ju pli ili proksimiĝas al ĝi, la ĥoro, kiu de malproksime estis tiel kunsenta kaj harmonia, aŭdiĝas ĉiam pli malorda. Malpacoj — krioj — insultoj eĉ aŭdiĝas: returnen, haltu, antaŭen, perfido! Ioma konsterno ekregas ilin, sed ĝi ne longe daŭras. Baldaŭ el la brusto elŝiriĝas la voko:

Hej! fratoj, amataj de l' vero senditoj,
Ni veku kuŝantajn en dormo spiritojn,
Ni restu eterne fidelaj
Al Majstro!

La junuloj tuj orientiĝis aŭ antaŭsentis la ĝustan direkton!

Antaŭ la granda aro, al kiu ili aliĝis, etendiĝas senlima maro de l' estonto. Iri nesingarde kaj senplane antaŭen — signifas droniĝi, returnen aŭ resti — estas forputri. Ĉe la bordo staras mistera „Ŝipo“ . . .

*

*

*

Ĝis nun iris ambaŭ junaj poetoj konsente kaj egalpaŝe. Sed ĉu ili estas ambaŭ same fortaj? Ĉu ĝis la fino de l' vojo ili povos tiel same kune iri? Jen estas decida momento. Sidiĝi en la ŝipon-homaron kaj kun ĝi naĝi en nekonatan estonton, eble, se oni estos sufiĉe forta kaj lerta, preni la direktilon en la manojn kaj konduki Aŭ resti sur la bordo: ĉi tie ankaŭ estas bele: ĝardenoj etendiĝas de l' revo, „muziko ĉarma, dia“ sonas en ili, knabinoj anĝelaj altiras. Tinto tro granda, tro alloga. Kiu ĝin kontraŭstaros? . . .

Eska enŝipiĝas:

Sur blua maro ŝipo naĝas
Kun etendita velo . . .
Kien rapidi ĝi kuraĝas?
Sur blua maro ŝipo naĝas
Al malproksima celo.

— — — — —
Al land' ŝip' naĝas nekonata,
Ĝin batas ond' sovaĝe,
Per lerta mano kondukata,
Al land' ŝip' naĝas nekonata
Antaŭen kaj kuraĝe!
— — — — —

En la patrujo estis sufoke, mizere, katenoj de l' mallibero mordis la manojn ne permesante el la liro eltiri pli laŭtajn tonojn, la ĝemo nur elŝirigadis el la brusto. Kaj nun? Denove la poeto demandas:



Wiktor Elski (Stanislaw Braun).

taŭe ŝajnis al la poeto, ke nur en la patrolando mizero estas senlima — nun li vidas, ke ĝia regno etendiĝas tra la tuta mondo, kaj ĉie al rido de satuloj korpaj kaj spiritaj respondas eĥe ĝemo de l' doloro, de sufero, de malsato. Do la poeto klinas la kapon. Ankorau li provas sin defendi:

Ho, nigraj pensoj, for de mi malnoblaj!
Vi vane tentas min,
Ĉar koro mia per fortoj duoblaj
Kontraŭbatalas vin.

provas serĉi forgeson en brakoj knabinaj:

Tenu manojn sur brak' mia,
Diru pri l' espero . . .

Alvenanta el tutmondo
Hej, vi vento!
Ĉu en ĉiuj lokoj kreskas
Malkontento?
Ĉu en ĉiuj lokoj homoj
Per tutforto
Bataladas kun fervoro
Kontraŭ sorto?
La vento respondas

al li:

Multaj, ĉion forgesante,
Vivon ĝuas.
Ili ĝuas en feliĉo
La bonstaton
Kaj aliaj suferadas
Nur malsaton.

Kaj la suno petata,
ke ĝi la larmojn el
homaj okuloj sekigu,
parolas:

Hej, vi homo, mi entute
Estingiĝus
Kaj ne ĉiuj homaj larmoj
Elsekiĝus!

Malbono estas eterna
kaj ĉiu loka. An-

Ĉar la vortoj el buŝ' via

Tenas min sur tero,

Diru pri l' espero . . .

Sed tio estas haŝiŝo, opio, kies efiko ne estas longedaŭra. Per ĝi li ne dormigos la animon, ĝi ne forgesigos al li la mondoloron. Sufiĉas malmulto — la plej malgranda ekgrinco de ĉirkaŭanta mezo por tuj lin veki kaj rememorigi la malgajan efektivon.

Ankoraŭ plej bone sentas sin la poeto en lando kreita de lia fantazio, malproksime de homoj, de la mondo. Tie regas la deziregata serena kvieto, tie li esperas „forgesi suferon, trovi esperon, vivon teran reami.“ Tamen ĝi estas kaj restas nur deziro neplenumbla. Eterne stari forte sur la tero kaj teni alte la kapon en la ĉieloj oni ne povas. Malgaja vivo! „Nur dornoj, kardoj sur vivvojo.“ Kaj tial konstante

Malĝojon sonos mia liro

Ĝis ne pereos ĝi!

*

*

*

Malpli lacigan, ŝajne pli facilan vojon elektis Wiktor Elski Li restis sur la bordo, eniris la bele konservatajn ĝardenojn kaj avide ensorbadis la ravajn melodiojn de l' knabinaj kantoj:

Muzikon aŭdas koro

Kaj tremas kun fervoro

Pro ĝia sankta ton',

Pro ĝia forta son';

Kaj rava melodio

Enfalas per radio

De la balzamor'

Al mia kor'.

Tie ĉi ankaŭ ni trovas eble solvon de unu el la kaŭzoj, pro kiuj la ambaŭ amikoj disiĝas. Eska pli bone eksentas rekte la naturon, kun ĝi kunvivas, el ĝi ĉerpas. La arbaro murmuras al li melodiojn misterajn, li ripetas ilin sur sia dukorda liro kaj tradukas ĝian lingvon en lingvon homan. Kun brua ond' li kantas himnon, kaj oni ne scias, ĉu maro akompanas lin aŭ li la kordojn agordigis al ĝi. Plena, senpera kunsento kun la naturo — ĝi neniajn havas por li misterojn.

(Finota).



Soeben erschien:

CARMEN SYLVA

(ELISABETH, REĜINO DE RUMANUJO)

SUFERO

— Originalo germana —

— Traduko esperanta —

— Ses tradukoj —

(angla, franca, hispana, itala, pola, rumana)

— fariĝintaj el la traduko esperanta —

Eldonigis

Prof-ro D-ro Siegfried Lederer

Prezo: 0,40 Sm (Mark 0,80)

La mona profito de tiu ĉi libro apartenas
al la blindulejo „Vatra Luminoasă“

Eldonejo:

Heckners Verlag, Wolfenbüttel (Germanujo)

Eldonejo: Heckners Verlag, Wolfenbüttel (Germanujo)

- Bildolibro sen bildoj.** De H. Chr. Andersen. El la dana originalo tradukis Prof-ro D-ro Lederer. VIII+35 paĝa, kun la portreto de Andersen, bele bindita 1,— Mk.=0,50 Sm.
- Sufero.** Fabelo de Carmen Sylva (Elisabeth, reĝino de Rumanujo.) Originalo germana; traduko esperanta, ses tradukoj (angla, franca, hispana, itala, pola, rumana) fariĝintaj el la traduko esperanta. Eldonigis Prof-ro D-ro Siegfried Lederer 0,80 Mk.=0,40 Sm.
- Minna de Barnhelm.** Komedio en kvin aktoj de G. E. Lessing, esperantigita de Adolf Reinking 1,25 Mk.=0,65 Sm.
- Gustaf Vasa.** Historia dramo en kvin aktoj de Reinhold Schmidt 1,50 Mk.=0,75 Sm.
- Esperanta Stenografio** laŭ la sistemo de F. X. Gabelberger verkis D-ro A. Schramm 0,50 Mk.=0,25 Sm.
- Esperantaj poŝtkartoj:**
- 100 belaj, artefaritaj, multkoloraj 5,— Mk.=2,50 Sm.
- 100 belaj poŝtkartoj „Nova Stelo“ 3,— Mk.=1,50 Sm.
- Universo.** Internacia revuo por la belo. Kun prof. D-ro Lederer redaktita de D-ro Albert Schramm, jare 6,— Mk.=3,— Sm.
- Rund um die Welt.** Eine Zeitschrift für Esperantisten und solche, die es werden wollen. Herausgegeben von Professor Dr. Lederer und Dr. Schramm 3,— Mk.=1,50 Sm.
-
-

- Schramm.** Lehrbuch der internationalen Hilfssprache „Esperanto“ 22. Auflage 1,— Mk.=0,50 Sm.
- Schramm.** Schlüssel zum kurzgefaßten Lehrbuch der internationalen Hilfssprache Esperanto 0,50 Mk.=0,25 Sm.
- Schramm.** Fortbildungsbuch für den Esperanto-Unterricht 1,— Mk.=0,50 Sm.
- Schramm.** Schlüssel zum Fortbildungsbuch für den Esperanto-Unterricht 0,70 Mk.=0,35 Sm.
- Blachstein.** Die Esperantosprache im deutschen Munde 0,25 Mk.=0,12 Sm.
- Blachstein.** Das Grundgesetz des Esperanto 0,25 Mk.=0,12 Sm.
-
-

Eldonejo: Hachette & Co., 79 Bd. St. Germain, Paris

- La Revuo,** internacia monata literatura gazeto, kun la konstanta kunlaborado de D-ro L. Zamenhof. Jare (Francujo: Fr. 6.) (eksterfrancujo) Fr. 7=Sm. 2,75